

Tiu nivelo baziĝas je la specifo *Salto* de la Konsilio de Eŭropo. Ĝi pritaksas, ĉu la kandidato kapablas elturniĝi en la bazaj situacioj de la ĉiutaga vivo, komenci kaj vivteni baznivelan komunikadon en sociaj, kulturaj kaj laborejaj rilatoj.

	Daŭro	Taskotipo	Longeco	Poentoj	Minimumo
Parole	10 minutoj	<b>Libera interparolado</b>	ĉ. 4 minutoj	40 poentoj*	16 poentoj
		<b>Memstara prezento de temo</b> (surbaze de bilda stimulo) (la ekzamenato elektas unu el du bildoj)	ĉ. 3 minutoj		
		<b>Situacia ludo</b> (la ekzamenato prenas unu el la laŭtema stoko)	ĉ. 3 minutoj		
	30 minutoj	<b>Aŭda kompreno de sonregistraĵo</b> - parte redaktita dialogo (multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo) - (redaktita) teksto el aŭd-vidaj publikaĵoj (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo, ktp.)	1800-2200 n	20 poentoj	8 poentoj
<b>Parola ekzameno</b>				<b>60 poentoj</b>	<b>36 poentoj**</b>
Skribe	120 minutoj	<b>Legakompreno</b> unu pli longa aŭ du malpli longaj (redaktita(j) skribnorma(j) teksto(j))  (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo, vera/malvera)	2600-3000 n	20 poentoj	8 poentoj
		<b>Letero (skriba sinesprimo)</b> eblas elekti el du temoj;  laŭ kvar aŭ kvin skemeroj	13-15 linioj  (ĉ. 100 vortoj)	20 poentoj	8 poentoj
		<b>Lingvokonaj taskoj</b> diverstipaj, gramatikaj kaj leksikaj taskoj (kompletigo el aŭ sen listo, transformo, ktp.)	20 unuoj	10 poentoj	ne estas
<b>Skriba ekzameno</b>				<b>50 poentoj</b>	<b>30 poentoj**</b>
<b>Sume: Kompleta ekzameno</b>				<b>110 poentoj</b>	

\* Komunika valoro 15, Vortotrezoro 15, Lingva ĝusteco 10 poentoj.

\*\* La sumaj minimumoj de la ekzamenpartoj ne egalas al la po-taskaj minimumoj.

**Por sukcesi en la ekzameno oni devas atingi kaj la po-taskan kaj la suman minimumon.**